# Les Cahiers de GRÉSILLON



## Revue Espérantiste

d'Information, de Culture et d'Amitié Internationale

*paraissant au moins tous les deux mois*

Publiée sous les auspices de la **Maison Culturelle Espérantiste**

*Directeur de la publication* :
H. MICARD, Instituteur Honoraire
Epineux-le-Séguin (Mayenne) - *Tél. 1*


N° 4

JUILLET - AOUT

1958


*ABONNEMENTS* :

a) simple : 200 francs par an.
b) de membre soutien : 500 francs par an.
c) de membre bienfaiteur : 1.000 francs par an.

*A VERSER A* :

Maison Culturelle Espérantiste - Château de Grésillon
BAUGÉ (Maine-et-Loire) — C. C. P. NANTES 1485-39

# Nous avons à votre disposition

1. Des cartes postales du château, 4 vues différentes, prix unitaire ..... 25 fr.
2. Des cartes mignonnettes (vœux de Nouvel An) 2 vues différentes du château, livrées avec enveloppes, prix unitaire ..... 25 fr.
3. Des canifs fabriqués à Thiers, excellente qualité, avec les mots Esperanto Kastelo Gresillon 400 fr.
4. Des porte-clefs (cliché du château) ..... 250 fr.
5. Des broches (cliché du château) ..... 200 fr.
6. Des médailles (cliché du château) ..... 150 fr.
7. Des fanions espérantistes ..... 130 fr.
8. Des insignes (broches, boutonnières...) ..... 100 fr.
9. Recueil de chants (sans musique) ..... 50 fr.

10. **NOUVEAUTÉ** : timbres de propagande. Vue du château, 4 couleurs.
La feuille de 10 timbres : 50 francs.
Modèle ci-contre :




Ajoutez 15 % pour frais de port et adressez vos commandes à :

**MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE**
**Château de Grésillon**
**BAUGÉ (M.-et-L.) — C.C.P. 1485-39 Nantes**

Remise de 20 % et franco de port à tous les groupes locaux voulant bien se charger de la vente parmi leurs membres.




## *Renseignements pratiques et permanents*

Adresser toute la correspondance à : **MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE**
Château de Grésillon, Baugé (M.-et-L.) - Tél. : 34 à Baugé

Pour les versements, bien noter que la M.C.E. possède **DEUX C.C.P.** :

Le **PREMIER** concerne sa trésorerie générale. Il convient de lui adresser :

a) le montant des parts de sociétaires ;
b) le montant des prêts.

Il est ainsi intitulé : **Maison Culturelle Espérantiste,** 11, rue Alain-de-Rougé, Sablé-sur-Sarthe (Sarthe). C.C.P. Nantes 988-14.

Le **DEUXIEME** est destiné à la vie ordinaire de la M.C.E. Il convient de lui adresser tout ce qui ne concerne pas le premier. Exemple :

a) le montant des séjours ;
b) les droits d'inscriptions ;
c) les abonnements à la revue « Les Cahiers de Grésillon » ;
d) Les commandes diverses : cartes postales, porte-clefs, etc.

Il est ainsi intitulé : **Maison Culturelle Espérantiste,** Château de Grésillon, Baugé (M.-et-L.). C.C.P. Nantes 1485-39.

Indiquez toujours au dos de votre chèque le motif du versement.

# UN SYMBOLE

*Je me trouve, en cette splendide journée de juin, dans les salons encore déserts de notre château. Au dehors, la nature chante, un soleil éclatant miroite sur l'étang encore herbu, ses reflets s'animent sur les feuillages tremblants. Les allées sont propres et nettes, les foins odorants reposent encore sur le pré. Les programmes sont prêts, nous attendons nos premiers estivants, qui peu à peu vont remplir joyeusement cette solitude. Ceux qui sont nos vieux amis, ceux qui d'année en année reviennent et constatent des améliorations mûrement réfléchies vont avoir une surprise : la salle de jeux est passée dans l'ancienne véranda refaite et aménagée, elle laisse place pour la bibliothèque qui sera en même temps salle de correspondance, de lecture et de réflexion.*

*Des amis bien intentionnés nous ont quelquefois fait remarquer, que hormis le côté agraire de notre propriété, la partie CULTURELLE de notre œuvre n'y était guère matérialisée. Nous faisons des stages, des cours, des conférences, bien sûr. Mais tout cela se dissipe comme la fumée. Or nous avons enfin notre bibliothèque. Elle est bien modeste : un salon de 4 mètres sur 7, des vitrines et des rayonnages, des tables, des sièges. Mais tout dépend de ce que nous en ferons. Je crois qu'il ne faut pas chercher à égaler certaines bibliothèques très importantes qui se sont spécialisées dans les ouvrages en langue internationale. Grésillon n'est pas dans une ville et ce n'est pas un musée. Nos livres, nos documents doivent refléter la pratique de l'Esperanto, les œuvres du Maître et des plus grands noms de l'Esperanto, c'est nécessaire. Mais à quoi serviraient toutes ces brochures du passé, toutes ces traductions d'œuvres bien secondaires faites par des espérantistes bien intentionnés mais peu éclectiques quelquefois. Notre bibliothèque doit être, toutes proportions gardées, comme ce Maurithuis de La Haye qui ne renferme que des peintures de première grandeur. Plus encore, elle doit accompagner, souligner, garder le témoignage hautement culturel ou pratique de nos programmes. Ce n'est pas par hasard que, les années précédentes, nous avons fait venir pour parler en Esperanto des personnalités comme l'ingénieur De Waard, le Dr Lapenna, le Professeur Waringhien ; que cette année encore nous aurons le plaisir d'entendre le Professeur Neegaard ou le Docteur Albaut. Nous pensons qu'une langue ne peut recevoir de consécration pratique qu'en tant qu'elle est le véhicule de pensées élevées ou de services importants dans le domaine pratique, c'est l'Histoire qui nous l'apprend. Nos livres, nos documents doivent matérialiser ce point de vue. Et le document imprimé n'est pas seul aujourd'hui. Grâce à la persévérance de notre Président, des films avec commentaires en Esperanto ont été combinés, des enregistrements sur magnétophones effectués. Tout cela embelli, complété doit être notre documenthèque passionnante, criante de vérité pour montrer aux éternels sceptiques et esprits supérieurs que l'Esperanto est une langue vivante.*

*Je fais appel à tous les amis qui pourront aider à enrichir notre bibliothèque dans le sens qui vient d'être dit. Offrez à Grésillon de bons livres, des œuvres scientifiques, actuelles, en Esperanto, accroissez notre puissance culturelle qui sera symbolisée par une documentation vivante sur nos activités d'hier et de demain.*

R. WATIER.

# L'ACTUALITÉ ESPÉRANTISTE

## UN APPEL D'U.E.A. POUR L'ANNÉE ZAMENHOF

Le Comité d'organisation international prépare les manifestations qui marqueront, en 1959, le centenaire de la naissance de Zamenhof.

Pour donner à ces manifestations l'ampleur nécessaire, le Dr Lapenna, secrétaire de ce Comité et d'U.E.A. invite tous les espérantistes à souscrire largement pour alimenter le fonds spécial qui couvrira les frais. Les groupes sont priés d'organiser des collectes.

***

## DES MINISTRES ESPÉRANTISTES

M. Soren Olesen, ministre des Affaires intérieures du Danemark a pris la parole en esperanto au Congrès de l'Association espérantiste de ce pays et au Congrès international des Cheminots espérantistes.

M. Drees, Premier ministre des Pays-Bas, et le ministre des Affaires sociales de Finlande, parlent aussi couramment l'esperanto, ainsi qu'un certain nombre de diplomates et de parlementaires de plusieurs pays.

***

## CONGRÈS DES CHEMINOTS ESPÉRANTISTES

Le 10e Congrès international des Cheminots espérantistes s'est tenu à Aarhus, au Danemark, du 10 au 16 mai, en présence de plus de 300 participants de 17 pays.

Le Ministre de l'intérieur danois, parlant en esperanto, a ouvert le Congrès. Le Directeur des chemins de fer a pris également la parole.

La réalisation progressive d'un vocabulaire technique a occupé une importante séance de travail.

Le 11e Congrès aura lieu à Linz (Autriche), du 9 au 15 mai 1959.

Au Congrès Universel de Mayence, des Cheminots espérantistes assureront un service de renseignements pour les Congressistes. Une réunion spécialisée, une visite professionnelle, sont prévues pour les cheminots présents.

Rappelons l'adresse de la section française : Association des Cheminots espérantistes, 11, rue de Milan, Paris.

***

## ASSOCIATIONS SPÉCIALISÉES

**Joueurs d'échecs** : Ecrire au Dr V. Faigl, Zlonice, Tchécoslovaquie, responsable de « Esperanta Saka Ligo Internacia ». Une rubrique régulière paraît dans « Esperanto ». Une réunion est prévue au Congrès de Mayence (s'informer à S-ro T. Lindberg, Prässebo, Suède). Pour participer aux tournois par correspondance, s'adresser à S-ro Duthilleul, 35, rue de Bayeux, Caen.

**Architectes** : Ecrire à : Ark. Tekn. Vladimir Sturcelj, Krašova ul. br. 27/IV, Zagreb, Yougoslavie.

**Artistes** de toutes branches, peintres, sculpteurs : s'adresser à S-ro Josip Vrančič, Mmj. galerija, Dubrovnik, Yougoslavie.

**Travailleurs de l'imprimerie** et professions annexes : « Internacia Grafika Esperanto-Ligo » publie un bulle-

tin bimestriel. Ecrire pour la France, à A. Frangeul, 42, rue du Pré-Pigeon, Angers (M.-et-L.).

« **Les Amis de la Nature** » : L'association ouvrière internationale de tourisme populaire « Les Amis de la Nature » possède une section espérantiste très active publiant un intéressant bulletin imprimé et illustré : « La Migranto ». Ecrire à Maurice Omé, 5, rue Rabelais, Rennes (I.-et-V.). La section a des délégués dans 12 pays.

(Voir aussi l'article de notre dernier numéro sur le « Centre de liaison des Campeurs espérantistes »).

**Parents espérantistes,** vous trouverez toute documentation pour l'éducation bilingue de vos enfants, dans : « Bulteno Gepatra ». Abonnement : 400 fr. à S-ro G. Odent, 46, rue Rouget-de-l'Isle, Calais (P.-de-C.).

***

### PROJET DE COURS INTERNATIONAUX A RADIO-HILVERSUM

Une très intéressante initiative est en préparation à l'occasion de l'année Zamenhof : un comité prépare une série de cours internationaux faits par un éminent espérantiste et portant sur l'étude de la littérature espérantiste. Ces cours seront diffusés à Radio-Hilversum et les textes seront, à l'avance, envoyés aux espérantistes inscrits de tous pays. Ecrire à : S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 29 b, Rotterdam-12, Pays-Bas.

***

### L'ESPERANTO AU CONGRÈS DES AVEUGLES AMÉRICAINS

Au 3e Congrès Panaméricain des aveugles qui s'est tenu à Montevideo, en mars, une résolution en faveur de la diffusion de la langue internationale parmi les aveugles et l'instauration de cours dans leurs écoles et institutions, a été adoptée.

***

### DEUX PUBLICATIONS D'U.E.A.

— Le « Jarlibro » (annuaire) 1958 d' « Universala Esperanto Asocio » est paru. Cet excellent instrument de travail, uniquement livré aux membres individuels d'U.E.A., contient de multiples renseignements et bien entendu les adresses des délégués (2.539 pour 62 pays). Signalons toutefois que cette liste n'est à jour que jusqu'à la fin de janvier. Les utilisateurs auront donc à consulter les listes supplémentaires et les changements publiés dans « Esperanto » depuis février.

— Pour la première fois cette année, U.E.A. a publié un supplément littéraire à « Esperanto » ; ce cahier de 72 pages, intitulé « Belarto » est abondamment illustré et constitue une lecture de premier ordre.

Nous pouvons aussi attirer l'attention de nos lecteurs, dans ce domaine, sur la valeur exceptionnelle du n° 2 de 1958, de la revue « Norda Prismo », entièrement consacré à la culture allemande (poètes, écrivains, philosophes, savants).

***

### POUR AVOIR DES CORRESPONDANTS SOVIÉTIQUES

— S'adresser en indiquant adresse, âge, sexe, thèmes préférés, à : « Koresponda Servo Esperantista », p/k 110, Gorki 7, U.R.S.S.

Des revues et des livres espérantistes sont demandés (par poste recommandée) ; indiquez ce que vous désirez en échange. Adresse : A. P. Drosdow, Astronomiceskij pereulok 16, Taschkent-52, U.R.S.S.

***

### DÉPLIANTS TOURISTIQUES

— Comme suite à notre note du dernier numéro, nous vous conseillons de demander plusieurs exemplaires d'un nouveau dépliant en esperanto sur la Suède (avec grande carte du pays). Ecrire à : « Svenska Turistrafikförbundet », Stackholm C.

— Les chemins de fer allemands ont édité aussi toute une série de dépliants et brochures en esperanto. Les demander à : « Bundesbahn-Werbe-und Auskunftsamt, Poststrasse 6, Frankfurt (Main), Allemagne.

(Ecrire en esperanto).

***

### FÉDÉRATION DU MASSIF-CENTRAL

Le congrès annuel a eu lieu à Sancoins (Cher). Plein succès. 150 participants. Rapports intéressants. Prochain congrès à Vierzon.

# LA VIE DE NOTRE REVUE

Le présent numéro est adressé à nos abonnés seulement. Nous commencerons, en octobre, un recrutement systématique en France et à l'étranger. Dès maintenant, faites abonner vos amis. Merci.

## Abonnés - Bienfaiteurs

**(Versement minimum : 1.000 francs)**

Total des listes précédentes ..... 76.000

**Quatrième liste**

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Micard Jean (Calvados) | 1.000 |
| 2. | R. Viller (Seine-et-Oise) | 1.000 |
| 3. | S-ino Nielsen (Danujo) | 1.000 |
| 4. | Anonyme (Marne) | 1.000 |
| 5. | Mme Nicolaï (Sarrelando) | 1.000 |
| 6. | M. Belhoste (Paris) | 1.000 |
| 7. | M. Patrin (Seine) | 1.000 |
| 8. | Mme Delbard (P.-de-C.) | 1.000 |
| 9. | Mlle Gaillard (Vaucluse) | 1.000 |
| 10. | Mlle Poueymarie (Htes-Pyr.) | 1.000 |
| 11. | Mme Leffiliâtre (Manche) | 1.000 |
| 12. | M. Busson René (Sarthe) | 1.000 |
| 13. | Mlle Protat (Rhône) | 1.000 |
| | Total ..... | 89.000 |

## Abonnés - Soutien

**(Versement minimum : 500 francs)**

**Première liste**

| | | |
|---|---|---|
| 1. | M. Jannez (Gard) | 500 |
| 2. | Mlle Chérie (Calvados) | 500 |
| 3. | Mlle Bois (I.-et-V.) | 500 |
| 4. | Mlle Reynaud (Isère) | 500 |
| 5. | Mme Gervais (L.-et-Ch.) | 500 |
| 6. | Mlle Durand (L.-A.) | 500 |
| 7. | Mlle Metta (Loiret) | 500 |
| 8. | Mlle Charlet (Rhône) | 500 |
| 9. | M. Llhorens (Vaucluse) | 500 |
| 10. | M. Deslandes (Vendée) | 500 |
| 11. | M. Fabry (Maroc) | 500 |
| 12. | M. Slot (Nederlando) | 500 |
| 13. | M. Bouyne (Ch.-M.) | 500 |
| 14. | M. Modrin (P.-de-C.) | 500 |
| 15. | Anonyme (Seine-et-Oise) | 500 |
| 16 | Palmgren (Suède) | 500 |
| | Total ..... | 8.000 |

Merci à tous. MICARD.

# LA VIE DE GRÉSILLON

## NOS STAGES

Petit à petit, le château se garnit. Il y a encore quelques places, du 10 au 31 août. Elles sont plus nombreuses pour les autres périodes. Comme chaque année, les adhésions sont tardives, ce qui complique notre tâche.

Pour septembre, le château est à votre entière disposition. Comme vous le verrez par le tableau qui suit, nous aurons, **du 8 au 20 Septembre, un SEJOUR TRES INTERESSANT.**

Nous espérons que vous y serez nombreux.

MICARD.

## Conseil d'administration du 15 Juin 1958

Présents : MM. Bodereau, Busson, Mme et M. Cheverry, MM. Chevalier, Ciret, Guillaume, Micard, Watier.

Excusés : Mlle J. Dedieu, MM. Babin, Coussé, Benistant, Guillot, Thébaud.

Secrétaire de séance : M. Watier.

La séance est ouverte par le Président Micard à 10 h. 15. Après lecture des lettres d'excuses et des suggestions qui y sont jointes, le Président passe à l'ordre du jour.

1. — **Situation financière.** — Examen des mouvements de fonds depuis le début de l'année. Tant du point de vue des actions que du point de vue des prêts, il y a sensiblement équilibre. Les rares demandes de remboursement d'action sont satisfaites sans qu'il soit nécessaire de recourir aux délais prévus par les statuts car des parts nouvelles sont en même temps souscrites. De même des prêts nouveaux sont venus compenser les remboursements : 260.725 d'apport contre 225.000 de remboursement. Toutefois de nouveaux remboursements sont à prévoir et les nouveaux prêteurs rendront beaucoup service.

Sur le chapitre des dépenses, des sommes importantes ont dû être engagées, notamment une provision de 200.000 francs pour la nouvelle chaudière du chauffage central, 241.871 fr. pour travaux divers prévus par le Conseil, et 166.443 pour les numéros de lancement des « Cahiers de Grésillon ». Les recettes ont été intéressantes dans les stages déjà effectués, notamment à Pâques avec une rentrée d'argent de l'ordre de 600.000. D'autre part les dons (61.600) et les souscriptions d'abonnés bienfaiteurs pour les « Cahiers » (114.065) constituent un apport appréciable. La trésorerie s'élève actuellement à : 619.461 francs, ce qui est suffisant mais le compte Caisse d'Epargne aurait besoin d'être plus élevé. Le Président estime qu'il existe un certain danger parce que les prêteurs sont peu nombreux avec des sommes assez importantes et qu'il faudrait au contraire un grand nombre de petits prêteurs. M. Cheverry pense qu'en cas de nécessité il serait facile de trouver des amis faisant de nouveaux prêts. Le Conseil approuve ce point de vue. Le Président conclut que la diminution de la trésorerie n'est due qu'aux dépenses d'investissement importantes et que cette situation continuera puisque d'autres investissements auront encore lieu jusqu'à la fin de l'année, mais que d'autre part la situation des stages s'annonce bonne. Il y a deux solutions : ou arrêt des travaux et remboursement de la dette ou continuer l'équilibre actuel comportant quelques risques et améliorer encore le château. M. Cheverry pense qu'il faut continuer les investissements. Le Conseil l'approuve.

2. — **Examen des divers stages 1958.** — Jusqu'à présent, il y a eu moins de demandes de renseignements en 1958 que l'année précédente, mais il faut tenir compte que en 1957 certaines annonces avaient été faites pour admettre des non-espérantistes et que d'ailleurs lorsque les personnes mises en rapport comprennent que le château est un centre culturel et non une maison de vacances, elles ne donnent pas suite. Les stages se présentent ainsi au 15 juin :

a) Jusqu'au 14 juillet : présence de quelques familles espérantistes ; à noter le passage de cheminots allemands. Le château serait à moitié rempli entre le 1er et le 14 juillet.

b) Vacances culturelles internationales du 15 au 27 juillet : assez nombreuses adhésions mais peu d'étrangers, cela en raison des difficultés politiques récentes. Le niveau culturel prévu pour ce stage sera peut-être difficile à atteindre.

c) Cours de français : grandes difficultés à prévoir en raison de l'absence des étrangers. On remédiera à cette carence suivant les circonstances.

d) Période du 10 au 31 août : plein succès prévu pour la période des cours.

e) Stage de l'U.E.F. en septembre : organisé par M. Ribot, du 8 au 20 septembre. Quelques adhésions de principe, la propagande est en cours. Le stage s'annonce intéressant pour la Maison.

f) Au sujet de la collaboration avec l'U.E.F., un membre du Conseil demande si un exposé a été fait au Congrès de Bordeaux. M. Guilaume répond qu'il en fut question dans les demandes diverses et que M. Babin a fait une courte intervention. M. Micard rappelle qu'il faut répéter le but essentiel de la Maison : mettre au service des Espérantistes pour leurs travaux culturels le cadre et l'hébergement convenable. Mais le Conseil ne reçoit pas assez de demandes de cet ordre et il est obligé d'organiser lui-même ses stages. Cependant si par lassitude de ce manque d'intérêt, on en venait à proposer à l'Assemblée Générale de mettre le château à la disposition d'autres mouvements culturels, les espérantistes qui ne témoignent pas actuellement le moindre intérêt protesteraient.

3. — **Rapport sur la propagande.** — M. Guillot n'a pas fait parvenir de nouveau son rapport. Le Président indique que l'on doit faire confiance à notre dévoué camarade. En ce qui concerne le réseau de publicité organisé par la Maison, le maximum a été fait.

4. — **Travaux en cours.** — Le Président donne le détail des améliorations déjà réalisées ou en cours. Aménagement d'une réception dans le hall ; postes d'eau dans les W.C.

Eclairage : tubes luminescents dans les grandes salles ; lampes au-dessus des lits dans les chambres.

Chauffage : la chaudière est livrée, on attend la livraison des radiateurs supplémentaires prévus.

Amélioration de l'arrière-cuisine pour lavage de vaisselle.

Matériel du jardin d'enfants : agrès et balançoires sont à livrer très prochainement.

Un appareil de photo sera acquis par la maison pour travaux spéciaux. M. Guillaume procurerait des facilités d'achat.

5. — **Les « Cahiers de Grésillon ».** — La parution des trois premiers numéros donne un déficit sérieux, surtout pour les deux premiers tirés à 1.500 exemplaires à titre de lancement. Il faut tenir compte que ces numéros permettent l'économie des tracts que l'on faisait an-

térieurement. A partir du n° 4 on limitera le tirage et on fera un service de propagande par roulement par 200 exemplaires.

M. Guillaume propose de changer d'imprimerie et de faire paraître les « Cahiers » en supplément de « Franca Esperantisto », ce qui éliminerait certaines charges. Mme Cheverry pense que cela aurait pour inconvénient de placer l'organe de la Maison sous l'égide de l'U.E.F., ce qui est contraire à la dernière décision de l'Assemblée Générale. M. Watier insiste sur la nécessité de séparer les organes de propagande pure comme « Franca Esperantisto » des revues consacrées au soutien de la langue internationale par la culture générale comme notre revue. Le Conseil est d'avis que le prix de l'impression devrait être revu, mais que d'autre part si la revue est suffisamment attrayante on peut augmenter le nombre des abonnés et le prix de l'abonnement. M. Micard indique les démarches déjà faites sans succès pour obtenir les avantages résultants de l'attribution d'un numéro de presse.

6. — **Projet de règlement intérieur.** — Suivant la dernière décision de l'Assemblée générale, un règlement intérieur doit être rédigé. M. Busson se charge d'établir un projet en deux parties : la première relative aux stages propres de la Maison Culturelle ou aux rapports avec les pensionnaires individuels, la seconde à l'usage des stages organisés sous la responsabilité d'autres associations ou groupements. Dans ce dernier cas les responsables règleraient tous rapports avec leurs stagiaires, un plan en blanc pour le logement leur serait remis. Le Conseil devra approuver ce projet de règlement.

7. — **Questions diverses.** — Sur l'initiative de Mme Cheverry une vignette du Château en 4 couleurs différentes est imprimée et mise en vente. Prix : 50 fr. la feuille de 10 (réduction pour les groupes). Une information sur ces vignettes sera faite par l'apposition sur les bandes de la revue.

— Centre de Recherches et de Documentation. — Le Président Micard rend hommage à l'œuvre d'information de grande valeur réalisée par le docteur Lapenna et propose le vote d'une subvention. Le Conseil est d'accord pour une somme annuelle de 10.000 francs. M. Watier est chargé de demander au C.E.D. un extrait de son catalogue et des exemplaires spécimen de ses rapports de propagande qui seront déposés à la bibliothèque du Château de Grésillon.

— Centenaire de la naissance de Zamenhof. — A l'occasion du centenaire en 1959, le Conseil propose une fête avec invitations à des personnalités éminentes. On couvrira des démarches pour obtenir de la ville de Baugé, l'inauguration d'une rue ou d'une place Zamenhof

— Legs Moitié. — Notre camarade Thébaud est chargé de reconnaître dans les publications déposées à Amiens ce qui pourrait être digne de figurer dans notre bibliothèque. M. Guillaume pense que la plupart de ces documents est inutilisable.

R. WATIER.

**Du 8 au**
**20 Septembre 1958**

**STAGE de l'U.E.F.**

*sous la direction effective*
**d'André RIBOT**

**Cours - Conversations**
**Exercices pratiques**
**Soirées agréables**

Ce stage s'adresse en particulier à tous ceux qui veulent acquérir la ***pratique de la langue*** — ***Vite votre adhésion,*** si vous voulez être bien placé...

# 1958 - aj Aktivaĵoj

En la jam aperintaj numeroj de la « Cahiers » ni parolis pri la ĉefaj aktivaĵoj de la 1958-a somero. La prelegontoj de la « Internaciaj Kulturaj Ferioj », la respondeculo de la dua periodo (Lernado de la Franca Lingvo) kaj la instruontoj de la « Esperantaj Kulturaj Semajnoj », klarigis al vi siajn intencojn. Sed oni ne multe parolis pri la ceteraj aktivaĵoj : bindarto kaj plekarto. Kvankam kelkaj ne konsideras ilin gravaj, ili multe interesas la partoprenantojn.

La libro-amantoj estas mult-nombraj. Sur ĉiuj librobretoj staras libroj, kies kovertoj estas difektitaj pro tro ofta legado. Oni ofte trovas librojn interesajn sed malnovajn en antikvaĵejoj. Oni ŝatas ilin sed oni ne kuraĝas meti ilin sur breton videblan. Dank' al amatora bindado vi povas vesti tiujn bonajn amikojn. Vi povos elekti la vestojn, kiuj ŝajnos al vi indaj. Sufiĉe rapide vi povos esti spertulo kaj fari bindaĵojn, kiuj fiere staros apud aliaj vestitaj de specialistoj. Post du aŭ trisemajna lernado en Gresillon, sub la gvidado de spertaj gejunuloj, vi kapablos plenigi la longajn vintrajn vesperojn per aktivaĵo ne nur interesa sed ankaŭ fruktodona. Gesamideanoj jam provis kaj ne bedaŭras la tempon pasigitan en la Gresillona bindejo. Despli ĉar ili, dum tiu tempo, bindis du aŭ tri librojn.

Plekarto ĉefe estas la afero de la virinoj kaj junulinoj. La laborejo estas ĉiam gaja loko, ĉar dum la manoj plektas la langoj multokupiĝas. Afable gvidataj de servema sinjorino la laborantinoj malkovras ĝis nun kaŝitajn kapablojn siajn. Sub la « feinaj » fingroj kreskas korboj diversformaj, pototegoj, glasingoj kaj diversaj aliaj ujoj. Plekarto ne estas interesa nur kiel persona aktivaĵo sed interesas ankaŭ la instruistojn, la edukistojn, ĉiujn personojn, kiuj profesie aŭ pro kroma agemo zorgas pri infanoj ; la infanoj multe ŝatas la plektadon de kano.

Tiuj aktivaĵoj, kaj ankaŭ la interesaj aŭ amuzaj vesperkluboj, konsistigas la ripozan parton de la diversaj periodoj. Dank' al ili restado en Gresillon estas kulturiga laŭ la plena senco de la vorto.

# Piedpromenadoj cirkaŭ Grésillon

Vi povis legi en la « kajeroj » priskribojn de diversaj kasteloj vizitindaj en la regiono de Grésillon. Certe dum via restado en la Esperantista Kulturdomo, vi vizitos kelkajn el tiuj kasteloj, kaj el tiuj vizitadoj vi kunportos neforgeseblajn memorajojn.

Sed, tute proksime de Grésillon, estas ankaŭ vidindajoj, kiujn oni povas facile atingi bicikle, eĉ piede. Tiujn apudajn vizindajojn mi rimarkigos al vi, ĉar ofte oni ne vidas la plej proksimajn kastelojn, preĝejojn, pejzaĝojn.

Tute proksime al Grésillon sidas la vilaĝo St-Martin-d'Arcé, apud kiu estas vidinda la kastelo de Sancé, konstruita dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj, ortangule disponigitaj sur platajo ĉirkaŭita de fosajoj. Larĝa aleego antaŭiras al la konstruajoj. Revenante de St-Martin al Baugé, ne forgesu viziti la malnovan preĝejon de Montpollin (apud la vojo de Baugé al La Flèche), kun sia navo el malnova stilo. En Baugé mem, estas kelkaj belaj vidindajoj : la kastelo (nuntempe urbdomo) konstruita ĉirkaŭ 1430 de Yolande d'Aragon, reĝino de Sicilujo, kaj patrino de la famkonata reĝo Renato. Interne oni povas vidi tre belan tureton kun belega ŝtuparo skulptita el ŝtono.

En la hospitalo, la apotekejo, kiu datumas de la 17-a jarcento, konservas belegajn lignajojn kaj fajencajn potojn. Ankaŭ en Baugé estas vizitindaj la preĝejo, kaj preĝejeto kun grandvalora kruco (14-a jarcento) farita el ligno de la vera kruco.

De Baugé, vi povas reveni al Grésillon ĉu rekte, ĉu tra Pontigné.

En tiu vilaĝo, vi vidos malgrandan preĝejon tre rimarkindan. Ĉi estis konstruita dum la fino de la 12-a jarcento. La pordego estas bela, kaj interne estas videblaj surmuraj pentrajoj de la 13-a jarcento. La sonorilejo estas tre rimarkinda.

Revenante al Grésillon, nepre vizitu la « dolmenon », gravan prahistorian konstruajon, meze de arbaro. De la dolmeno, vi povas rapide reveni al Grésillon tra herbejoj, kondiĉe ke vi ne timigu la tieajn bovinojn, aŭ ke vi ne estu timigitaj de ili.

P. CHEVALIER.

# Gramatikaj Respondoj

Korespondanto faris la jenan demandon : « Kio estas predikativo ? »

Mi legas sur la Plena Vortaro : « predikativo : adjektivo aŭ substantivo esprimanta kvaliton, kiun oni atribuas per helpo de verbo al subjekto aŭ al objekta komplemento. »

En la frazo : « la vino estas bona », la adjektivo estas la predikativo de la subjekto « vino ». Mi atribuas la kvaliton « esti bona » al la subjekto de la frazo. Tiu kazo estas tute simpla. La verbo, kiu ligas la predikativo kun la subjekto povas esti : « esti », « iĝi », « fariĝi », « montriĝi », « troviĝi », « resti », « aperi », « aspekti », ktp. Tiuj verboj montras la komencon de nova stato, la daŭron de stato aŭ la ŝajnon.

Oni povas rilatigi la predikaton ankaŭ al objekta komplemento. En tiu kazo la kvalito esprimata dependas nur de percepto aŭ opinio de la subjekto.

Ekz. : « Mi trovas la vinon bona », signifas, ke **laŭ mia opinio** la vino estas bona. La adjektivo ne akordiĝas kun la objekta komplemento.

Se oni deziras esprimi konstantan kvaliton de objekto, oni uzas epiteton, kiu akordiĝas : ekz. : Mi trovas la bonan vinon (post serĉado mi trovis, el diversaj aliaj boteloj, tiun, kiu entenas la vinon, **kiu estas bona.)**

Aliaj ekzemploj de neakordiĝantaj predikativoj : Mi kredis lin timema (laŭ mia opinio).

Ni elektis lin prezidanto (ni atribuis tiun titolon al li).




*Mi trovis la bonan vinon*




*Mi trovis la vinon bona*

## Turisma kroniko

# La Kastelo de AMBOISE

En la kastelregiono, Amboise kaj Blois dum longe konkuris. Amboise posedas specialan karakteron ; ĝi pendigas sian kastelon sur roko abrupta. La urbo, ĉirkaŭata de bela promenejo estas riĉoplena je vidindajoj kaj memorajoj. Sed, speciale, la Kastelo kaptas la rigardojn kaj retenas streĉe la atenton. La konstruajo estas situata sur la montplatajo kiu rigardas kaj la Loire valeon, kaj la verdan Amasse valeon, sur la vojo de Orleans al Tours, proksimume je 25 kilometroj de tiu ĉi lasta urbo.

**Historio** : La superstara situacio de la kastelo rilate al la riverego diktis, oni diras, la elekton de la Romanoj : tie, Julius Cezare estis konstruinta « castellum ». Iom poste, Klovis kaj Alarik, Visigota Reĝo, renkontis unu la alian en jaro 496 precize sur la insulo sankta Johano kiu dividas la riveregon en du partojn. Tiam, kastelo iam ekzistis sur la monteto. Ludoviko la « Balbutulo » donacis Amboise al la Grafoj de « Anjou » kiujn sekvis la Grafoj de « Berri ».

Karlo la oka naskiĝis en Amboise kaj tie mortis akcidente. Li zorgis pri la rekonstruado de la Kastelo.

Ludoviko la XII-a kaj Francisko la 1-a vivis en Amboise kaj plibeligis la domegon dank'al artistoj venigitaj de Italujo. Oni citas speciale Leonardon de Vinci kiu venis en jaro 1516 kaj restadis ; li mortis proksime al Amboise kaj estis entombigita en la preĝejo en jaro 1519.

La deksesa jarcento estis por Francujo dolora epoko : la lando travivis la religiajn civilmilitojn.

En 1560, Francesko la dua, gvidata de la « Guise-anoj » rifuĝis en la kastelon ĉar la kalvinistoj gvidataj de la Princo Condé intencis lin kapti. Kiel oni scias, finfine la kalvinistoj perdis la militon kaj la kastelo fariĝis la teatron de teruraj masakroj. La Korteganoj rigardis tiajn mortbuĉadojn kvazaŭ distrajojn. Pli ol 1.500 kalvinistaj soldatoj kaptitaj estis pendigitaj ĉu al pendigiloj, ĉu al la kastelbalkono kiu, pro tio, ricevis la nomon « balkono de la konspirantoj ».

Poste, la kastelo estis ŝtata malliberejo kaj akceptis tiam famajn kaptitojn, kiel Abd-el-Kader (1847-1852).

Ludoviko la dekkvina donacis la Kastelon al la Duko de Choiseul en 1762. Kiam la Duko mortis, la bieno estis reaĉetita de la Reĝa familio. Nuntempe, ĝi estas posedajo de la « Orléans » familio..

### Arhitekturo

**Ekstere** : La montplatajo kiu portas Amboise aspektas kiel alta teraso, subtenata de dikaj muroj, flankumitaj per du rondaj turoj je la ekstremajoj ; flanke al la riverego Loire, la fasado posedas turegon nomitan « Tour des Minimes » ; flanke al la rivero Amasse, ĝi posedas alian turegon nomitan « Tour Hurtault ».

De la antikva Kastelo oni vidas la belegan Reĝan Loĝejon, konstruajon gotika-Renesancan ; iom subtegmente, oni povas admiri delikatan traboraditan galerion kaj, sur la tegmento mem, oni vidas beletajn fenestretojn.

Alia vidindajo : la flankajo konstruita dum la regno de Ludoviko la dekdua, laŭ Renesanca stilo. Orienta fasado flankumita per du rondaj turetoj.

La turego des « Minimes » estas suprekovrita de duobla teraso kun ŝtonfestonoj de kie oni ekvidas belegan panoramon ; dum bela vetero, oni videtas la Katedralon de la urbo Tours.

La du ĉefaj turoj posedas porveturilan deklivon kiu permesas la eniron en la Kastelon por la ĉevaloj.

**La interno** : La turisto devas nepre viziti la Kapelon dediĉitan al St-Hubert. Ĝi estis finkonstruita en 1493 kaj estas vera gotikarhitektura juvelo. Krom, ekstere, belega altreliefo, la interna dekoracio estas grandvalora.

La Reĝa apartemento prezentas al ni, en la ŝtata ĉambro, vidindan kamenon. Tie, la fenestroj malfermiĝas sur la fama balkono de la « Konspirantoj », kies ferartajoj estas majstrajo de la dekkvina jarcento. Sur la malsupra etaĝo, la gvardioĉambro aperturiĝas je arkadgalerio borderita per beleta ajurita ŝtona balkono. La Renesanca flankajo konsistas el tri sinsekvantaj ĉambroj enhavantaj antikvajn meblojn kaj lanbrodajojn.

La turisto kiu ŝatas belajn pejzaĝojn kaj arhitekturon, certe trovos ardan plezuron vizitante la Amboise Kastelon.

**Se vi ne konas nian Esperantistan Kulturdomon, io mankas en via vivo.**

# El la leteroj ricevitaj

El la multaj leteroj ricevitaj ni plezure elĉerpas la jenajn liniojn el letero sendita de Fino Violet C. Nixon el Anglujo, vic-prezidantino de I.L.E.I.

« Mi dankas vin pro la du numeroj de « Les « Cahiers de Gresillon ». La enhavo estas tre plaĉa. « La eta mapo je p. 2 kovrilo tre trafas... Miaj re« memoroj pri Gresillon estas tiel feliĉaj kaj mi « ĉiam kaptas okazon instigi viziton. Mi portos la « unuan numeron kun la aranĝoj al la Kongreso « de B.E.A. en Edinburgo, kie okazos ankaŭ kun« veno de S.B.E.T. Mi aldonas liston de nomoj kaj « adresoj ĉar pro iu aŭ alia kaŭzo, mi opinias, ke « tiuj havos intereson pri vizito. »

## Monda kroniko

# — Sofio —

Promenante laŭ la stratoj de nia ĉefurbo, oni vidus tre malmultajn monumentojn el la maltrankvila pasinteco de tiu ĉi urbo : parton de roma muro, la malnovajn preĝejojn de S-ta Sofia kaj de S-ta Georgo, la moskeon. La tempo, la elementoj kaj la krueleco de la homoj forviŝis la postsignojn de ĝia antaŭa beleco. Sed ĉe ĉiu fosaĵo la instrumentoj malkovras trovaĵojn, kiuj rakontas pri plej interesaj eventoj.

Sofio situas ĉe la 42-a paralelo, kaj oni supozus, ke ĝia klimato estas simila al la klimato de la Franca Riviero. Tamen pro ĝia situo en la centro de la Balkana Duoninsulo, pro ĝia rilative alta situo super la marnivelo (550 m.) kaj pro la proksimeco de Vitoŝamontaro la vintro tie ĉi estas pli malvarma, kaj la somero malvarmeta. La kampo ĉirkaŭ la urbo, trafluata de rivero Iskar kaj ĝiaj riverbranĉoj ; estas tre fekunda. Ĉirkaŭita norde de Balkanmontaro kaj sude de Vitoŝamontaro ĝi etendiĝas nordokcidenten, transirante en vastajn intermontojn, kiuj jam en prahistoriaj tempoj malkovris oportunan vojon por trafiko inter la Okcidento kaj Oriento. En la ĉirkaŭaĵo de la urbo, en la dise situantaj tombaltajetoj, ni ofte trovas postsignojn de iamaj kolonioj, kio atestas pri intensa vivo en la epoko de la neolito. En la 3-a jarcento antaŭ nia erao, tien venis la serdoj, kiuj metis la fundamenton de Serdika « la plej pompa urbo de la Serdoj » kiel ĝin nomas la antikvaj kronikistoj. Dum la regado de imperiestro Ulpio Trajano la urbo havis gravan administran, komercan kaj strategian signifon ? Al ĝia nomo la okupantoj aldonis ankaŭ la nomon de la imperiestro, Ulpia Serdika, kaj komencis rapide ĝin romanigi. Interne kaj ekstere, trans la muroj de la urbo, leviĝis marmoraj temploj de Asklepio, Apolono, Demetro, Triptolemo. Ulpia Serdika vivis riĉan kaj intensan kulturan vivon.

Post la 4-a jarcento antaŭ nia erao Ulpia Serdika suferis sinsekvajn atakojn de barbaraj invadantoj. La okcidentaj gotoj ruinigis grandparte la urbon kaj post ili, en 441, Atilo plene detruis ĝin, masakrante grandan parton de ĝia loĝantaro. Malrapide kaj malfacile restariĝis la urbo. Kiam la slavbulgaroj fondis sian regnon sur la Balkano, Ulpia Sredika denove fariĝis centra fortikaĵo en la bizantiaj teritorioj sur la Balkana Duoninsulo. En la unuaj jaroj de la 9-a jarcento la bulgara hano Krum okupis ĝin post pluraj militoj kaj stabiligis la regpotencon de la Bulgaroj sur la Balkano. Serdika apartenis al la vasta bulgara regno. Pro ĝia centra situo la slavbulgaroj ĝin nomis Sredec (kio signifas centra loko), kaj la urbo baldaŭ reakeris sian gravan kulturan kaj administran signifon. Sed en 1018 post la kapitulacio de la Okcidenta Bulgara Regno sub bizantia jugo, estis ankaŭ okupita Sredec, kiun la okupintoj nomis Triadica. En 1194 la armeo de la ribelintaj bulgaroj post kruelaj bataloj okupis la urbon kaj redonis al ĝiaj ruinoj la antaŭan nomon. Denove ekfloris Sredec. Tiutempe ĝi estis dua laŭ grandeco post la ĉefurbo Tirnovo. La preĝejo de S-ta Sofia estis restarigita. Unuan fojon oni mencias la hodiaŭan nomon de nia ĉefurbo en la « Ĉarto de Vitoŝa », omaĝa dokumento eldonita de caro Ivano Šišmano en 1382.

Dum la regado de sultano Murad (1546-1596) la malprosperanta urbo revigliĝis. Oni entreprenis vastajn bonkonstruadajn iniciatojn ĉe kio, bedaŭrinde, malaperis unu post la alia la belegaj restaĵoj de romaj, bizantiaj, bulgaraj palacoj bazilikoj, banejoj kaj temploj, per kies materialon la turkoj konstruigis moskeojn, gastejojn, mahometanajn ekleziajn lernejojn, turkajn banejojn, ŝprucfontanojn. Pasis malpli ol cent jaroj kaj Sofio jam ricevis aspekton de mahometana urbo ne nur laŭ sia arkitekturo ses ankaŭ etnografie. En la 16-a jarcento la urbo fariĝis sidejo de Rumelio. En la turkaj arkivoj de tiu tempo oni nomas Sofion « mermia » aŭ « medine ». Tio signifias « granda urbo », « urbo protektata de Allaho », titolo donata nur al plej gravaj urboj en la Otomana Imperio. Konsiderindan agadon disvolvis la Sofia Literatura Skolo, kies manuskriptoj konservitaj ĝis nun atestas pri neestingiĝinta kultura vivo. En la 18-a jarcento, rezulte de la anarkio reganta en la imperio, Sofio venis al plena dekadenco. Grafo Fernet de Saufbœuf informas, ke en 1780 la loĝantaro, timigita de la invadoj fuĝis en la montarojn, kaj ĉie en la urbo oni vidis nur ruinojn. Tio daŭris ankaŭ en la 19-a jarcento, Sofio suferinta pestepidemion, ne plus estis la sidejo de la prefekto.

La 4-an de januaro 1878 sofianoj renkontis kun pano kaj salo la liberigan rusan armeon de Generalo Gurko. Ĝi eniris tipan turkan urbeton kun ĝiaj malrektaj stratetoj kaj malaltaj domoj super kiuj leviĝis multaj minaretoj. Entuziasmigitaj de la akirita post 500 jaroj liberon, sofianoj komencis rapide rekonstrui sian ĉefurbon. Unu post la alia estis organizataj institucioj necesaj por la ekzistado de la juna ŝtato. Estis necese plani la novan ĉefurbon, kion oni faris per vico de drastaj rimedoj. Tamen la ŝanĝoj en la periferiaj kvartaloj okazis multe pli malrapide. La zorgoj de la ŝtato pri ili estis tute nesufiĉaj.

La 9-an de septembro 1944, kune kun la tuta popolo, ankaŭ sofianoj festis sian liberiĝon el la faŝismo, liberiĝon, kiun alportis al ili jam dua fojon la rusa armeo. Venis nova tempo. La senhoma post evakuado urbo revigliĝis. La loĝantaro mem mobilizis sin por likvidi la detruojn, kaŭzitajn de la bombardado. De la provinco venis novaj enloĝantoj kaj ĉefurbo komencis rapide kreski. Post la Unua Mondmilito Sofio havis 120.000 loĝantojn kaj okupis aeron de 8 km.2, kaj hodiaŭ ĝi havas 725.000 loĝantojn sur areo de 61 km.2. Nun en Sofio estas koncentrita kvinono de la tuta industrio de nia lando. Sed la zorgoj de la popola ŝtato ne elĉerpiĝas per urbkonstruaj kaj industriaj entreprenoj. Ni havas la ambicion fari Sofion unuaranga kultura centro. Pro tio oni direktas la atenton, antaŭ ĉio, al la estontaj generacioj.

Kaj nun ni kuraĝe povas diri, ke ni estas atestantoj de plej granda disfloro, kiun konis dum sia maltrankvila vivo Serdika-Triadica-Sofio, nia ŝatata ĉefurbo ! Ĝi firme insistas pri sia devizo : « Ĝi kreskas, sed ne malnoviĝas ».

(Parto de artikolo de Vitan Valov aperinta en la tre leginda kultura revuo : « Nuntempa Bulgario », eldonita en Sofio).

**DEZIRAS KORESPONDI**

1) S-ino Rajna Kasabova, instruistino, Str. Kiril k. Metodi 70, Kolarovgrad (Bulgarujo).

2) S-ro Victor Goranoj, Direktoro de Mezlernejo, Str. Bozveli 19, Kolarovgrad (Bulgarujo).

3) S-ro Dro Kiril Kasabov, Burgas Burgara Mineralakva banejo (Bulgarujo).

4) S-ino Evgenia Dro Mihailova, Bul. str. Car Osvoboditel 37, Varna (Bulgarujo).

# Por Distrigi

### SOLVO DE LA ENIGMO DE LA PASINTA NUMERO

La trovotaj vortoj estis :

Farunkomercisto, reprezentanto, evangeliistino, mineralogiisto, abelbredistino, numismatikisto, topografiisto, lanternisto, esperantisto.

Kaj la nomo de la urbo : Fremantle.

### NOVA ENIGMO

Jen listo de 22 vortoj : 1. okupo, 2. bruno, 3. piedo, 4. parko, 5. arako, 6. ŝelko, 7. mielo, 8. pulmo, 9. slipo, 10. amelo, 11. sango, 12. klavo, 13. marko, 14. akriri, 15. tramo, 16. falko, 17. sakro, 18. ferio, 19. gloro, 20. legio, 21, riski, 22. kalko.

Al ĉiu el la ĉi-supraj vortoj aldonu sesan literon tiel, ke vi povos formi sesliterajn vortojn, kies mallongaj klarigoj respektive estas : 1. bileto ; 2. juvelo ; 3. kartludo ; 4. arbeto ; 5. malsano ; 6. veturilo ; 7. aroma vegetajo ; 8. elemento ; 9. kurba linio ; 10. siropa restajo ; 11. longa ferpeco ; 12. litero ; 13. senluma kesto ; 14. duonridi ; 15. ordonanto ; 16. regnestro ; 17. fiŝo ; 18. malŝatata loko ; 19. birdeto ; 20. ia fermilo ; 21. labori ; 22. subtera kanalo.

La novaj literoj en la donita sinsekvo formas proverbon.

## Ni Ridu !

NUNTEMPAJO

Fremdulo : Sur kiuj lokoj oni trovas en ĉi-tiu regiono la plej belajn vidajojn ?

Enlandano : Sur la poŝtkartoj.

---

Maljuna kamparanino disputis kun sia eliranta edzo.

— Vi estas pli stulta ol la bestoj, diras la maljuna edzino. Ili almenaŭ scias, kiam ili sufiĉe trinkis.

— Sed, mia kompatinda edzino, respondis la maljuna ebriulo... Se mi trinkus nur akvon, mi tre bone scius, kiam mi sufiĉe trinkis.

***

ĈIUJ EGALAJ

— Nu, Miĉjo, vi havas en la lernejo novan instruiston. Ĉu estas bone ĉe li instruiĝi ?

— Ne, paĉjo, ili ĉiuj, tiuj instruistoj, estas egalaj ! Ĉiu scias nenion, sed ĉion demandas.

## A LA CLAIRE FONTAINE

(17-a jarcento, Turono)

★

Al la fontano klara
iris mi en pilgrim' :
estis ĝi tiel pura,
ke jen mi banis min.

Mi jam de longe vin amas,
ne plu mi forgesos vin.

Sub foliar' de kverko
tuj mi sekigis min...

Sur la plej alta branĉo
kantis najtingalin'...

Kantu, birdeto, kantu !
gajas al vi l'anim'...

Mia ne estas samo :
Petro forlasis min !...

Car mi al li rifuzis
rozon, pro ama tim'...

Se nur la rozo estus
plu en rozuja sin' !...

Kaj se l'amiko kara
amus ankoraŭ min !...

(Komenco de ĉiu strofo oni rekantu la du lastajn versojn de la antaŭa strofo).

(En traduko de G. WARINGHIEN.)

## La Aventuroj de Steleto



*La sonĝo daŭras !*
*Vera reĝa ŝtuparo !*



*Carma akceptado !*



*Vere internacia etoso !*



*Eĉ la bestoj estas afablaj tie ĉi !*



*Mi vere trovĝas en rondo familia !*

# Tra la Esperanta Literaturo

KIEN LA POEZIO ? de Brendon Clark — bindinta — 156 paĝoj — Eldonita de : The Esperanto Publishing Company, Anglujo — Prezo : 800 fr.

Brendon Clark mortis antaŭ du jaroj sed lia nomo restos sur la ora j tabeloj de la Esperanta Literaturo.

Skribinte « la celo de prozo estas sciigi ; la celo de poezio estas sentigi », li montras, ke tro ofte kiam oni legas esperant-lingvajn poemojn oni ne « sentas », pro tio ke oni multe cerbumas por kompreni. La flekskobleco de la universala lingvo tentas la vort-ludantojn. Ili mallongigas la esprimojn, poluras ilin, faras ilin brilaj, tiel brilaj kiel belegaj juvelŝtonoj... por riĉuloj. Sed ankaŭ la « granda publiko » esperantista bezonas poezion. Multaj el niaj samideanoj dezirus « senti » pere de vortoj la belecon de pejzaĝo, la belecon de ideoj, la belecon de... sentoj. Kiam oni vidas pentrajon oni tuj ŝatas ĝin aŭ ne, pro ĝiaj koloroj, pro ĝia ekvilibro ; ĝi sentigas al ni ion per sia tuteco. Ĉi ne donas plezuron se oni devas re-kunmeti la diversajn detalojn. Same, poemo ne donas plezuron se oni devas peni por kompreni la mallongigojn.

La unua parto de la libro de Brendon Clark temas pri « Principoj ». La aŭtoro preferas la naturajn ritmojn (trokeajn kaj amfibrakajn) ol la nenaturajn. Li preferas longajn versojn ol kripligitajn. Li malkonsilas la uzadon de la apostrofoj kaj de la neologismoj.

Kompreneble oni ne devas forigi la arte ĉizitajn juvelojn, kiujn poetoj prezentas al ni. Ili valoras por kelkaj kaj pruvas la grandan valoron de nia lingvo. Sed oni ankaŭ pensu pri la granda amaso de la legantoj, kiuj ŝatas poezion. Jes, Brendon Clark, revenu ni al pli simpla poezio !

En alia parto de sia libro, Brendon Clark donas originalajn poemojn, tradukitajn poemojn kaj kvazaŭ-sinonimojn.

Jen du el la originalaj poemoj, kiuj niaj legantoj povos traduki :

VENAS LA VENTO

Laŭlonge de tiu monteta konturo
La vico de pinoj en ombra purpuro
  Aŭskultas kun zorga atento ;
Kaj kiel orgeno, ilia susuro
Avertas la valon per plenuverturo :
  « Pretiĝu, ĉar venas la vento ! »

Ĉi venas kun voĉo fortege sonora
Kaj, dio el nubo, spirito esplora,
  Momenton la teron surspiras.
Kaj ĉiu kreskaĵo, ĉu arba, ĉu flora,
Tremante kliniĝas, piece fervora,
  Ĝis kiam la dio foriras.

PERFIDO

Ĉu vi scias, belulino,
Ke la belo vin insidis ?
Ve al mi, al vi la fino !
Mia amo vin perfidis.

Ĉar de vi mi tro admiris
La belecon de l'vizaĝo,
La edzino ekdeŝiris
Vian bildon de la paĝo !

# Service de Librairie de notre Revue

Responsable : THEBAUD, C.C. Filles, Caudry (Nord) — C.C.P. 323-82 Lille

**Prix franco.**

| TITRE | PRIX |
|---|---|
| **Etude** | |
| La Langue universelle Esperanto (Baronnet) | 370 |
| Gramatiko gvidilo | 360 |
| Sub la verda standardo | 675 |
| Por la praktikantoj (Babin) | 450 |
| Dictionnaires Franç.-Esp. (Grosjean Maupin) | 750 |
| Supplément au précédent | 360 |
| Nouveau dictionnaire Esperanto - Français (Waringhien) | 2.420 |
| Manuel d'initiation | 360 |
| Manuel d'études | 840 |
| A.B.C. libro | 100 |
| Esperanto por infanoj | 150 |
| Junulkurso | 380 |
| **Plena vortaro** | 1.300 |
| Miksa kurso | 300 |
| Vocabulaire de poche | 220 |
| Naŭlingva Etimologia leksikono | 720 |
| **Lecture** | |
| Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj | 1.300 |
| Aventuroj de Marteno Drake | 480 |
| Alaska Stafeto | 400 |
| Aktualaj problemoj de la nuntempa vivo (Lapenna) | 600 |
| Brulanta sekreto | 270 |
| Bagatelaro | 600 |
| Colomba | 150 |
| Dormanto vekiĝas | 450 |
| D-ro Dorner | 540 |
| De paĝo al paĝo | 490 |
| Eta kato | 15 |
| Ekspedicio de Kon Tiki | 1.600 |
| Esperanto 60-jara | 240 |
| Esperanta Krestomatio | 250 |
| El la maniko | 800 |
| Fabloj de La Fontaine | 150 |
| Fundamenta krestomatio | 1.200 |
| Fino | 330 |
| Gajaj edzinoj de Windsor | 230 |
| Geja leganto | 150 |
| Ĝoja pedio (broché) | 400 |
| Georgo Dandin | 210 |
| Hundo Kruso | 240 |
| Internacia lingvo (Lapenna) | 670 |
| Interpopala konduto | 480 |
| Infanoj en Torento | 480 |
| Infanoj kaj patrinoj | 420 |
| Junaj detektivoj | 420 |
| Junaj detektivoj | 150 |
| Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj | 980 |
| Karnavalo kaj la somnombulino | 270 |
| Kiso de la reĝino | 270 |
| Kredu min sinjorino | 700 |
| Koko krias jam | 840 |
| Kontralte | 840 |
| Leteroj de Lanti | 430 |
| La granda aventuro | 650 |
| La vojo returne | 420 |
| Leteroj de Zamenhof (2 vol.) | 2.400 |
| La nevenkebla ĝeno | 600 |
| Miru, pensu, ridu | 720 |
| Morto de trajno | 675 |
| Mokinda preciozulinoj (Molière) | 150 |
| Normandaj rakontoj | 1.300 |
| Originala verkaro | 1.400 |
| Printempo de Morto | 650 |
| Per gynt | 870 |
| Pariza Gvidlibro | 240 |
| Princo kaj Betty | 150 |
| Princino de Marso | 180 |
| Rozoj kaj Urtikoj | 720 |
| Roza Luksemburg | 730 |
| La Revizoro | 300 |
| Rakontoj pri Nederlando | 200 |
| Sep vangofrapoj | 300 |
| Sinjoro Tadeo | 720 |
| Tri homoj en boato | 700 |
| Tartarin de Taraskono | 720 |
| Tempo maŝino | 150 |
| Unua legolibro (Bartelmes) | 170 |
| Unua legolibro (Kabe) | 170 |
| Verkoj de Felikso Zamenhof | 990 |
| Virineto en Bluo | 300 |
| Vivo de Zamenhof | 420 |
| Vagabondo kantas | 320 |
| Vivi kantas | 650 |
| Zamenhofa legolibro | 200 |
| **Propagande** | |
| ABC de l'Esperanto (Waringhien) | 200 |
| **Chants** | |
| La Juna vivo | 120 |
| Gaja kantaro | 60 |
| Komuna kantlibro | 140 |

Vient de paraître : « **Kien la Poezio** », de Brendon Clark. — 156 pages ; relié : 800 fr.

Une excellente collection : **LA EPOKO** (Colomba, Dormanto vekiĝas, Brulanta sekreto, Princo kaj Betty, Tempo maŝino, Sep vangafrapoj, Virineto en bluo, Kiso de la reĝino, Karnavalo kaj la somnambulino).

Le responsable s'efforcera de vous fournir tout livre d'Esperanto même ne figurant pas sur cette liste. Si possible, donnez l'Editeur.

Le Gérant : H. MICARD

Sablé. — Imp. E. COCONNIER